

LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 164, 2020: 4



nacym.biz

Ĉu poezio necesas?

LA BLUA SONGÔ



J. M. Progiante



Autor: J.M. Progiante
Editora: Esprima, 2019
Formato: 19 cm, 60 páginas

Capa dura com ilustrações coloridas

Sequência do livro "La malbeno de Tarumo kaj Nurana" com os personagens reunidos, agora na Bélgica, para solucionar um novo mistério envolvendo o roubo de um diamante.

Preço: R\$ 39,00

LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 164, 2020: 4

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório



La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj

Kovrila imago el nodyn.biz © 2020 HD Wallpapers. Ĉiuj juroj deteniĝaj.

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca

05041-000 São Paulo, SP - Brazilo

Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183

easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2020

Simpla membro.....R\$ 150,00.

Subtena membro.....R\$ 300,00.

Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

Dejoroj:

Sabate: 9h - 12h

Escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la deĵoro daŭras de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere pro la Kultura Kunveno, kiu okazas posttagmeze (ekde la 16h).

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo Alencar Lima

Vicprezidanto: Paulo Sérgio Viana

1-a Sekretarino: José Roberto Tenório

2-a Sekretarino: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: Conceição Rodrigues

2-a Kasistino: Maria Delza Macabu

Propaganda Direktorino: Genildo Martins

Coelho

Konsilantaro

Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj José Mauro Progiante

Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha Sousa

ENHAVO

7

La 8a Eŭropa
Festivalo de Espe-
rantaj Kantoj Okazos
Ĉi-Jare

15

Ne ekzistas dankemo
sen ĝojo

22

Lingvaj respondoj

9

Intervujo

17

La milito

24

Librorecenzo

11

Omaĝo al mia
patrino

18

Tra la mondo

26

Neniu scias ke mi
estas tie ĉi

12


Ĉu poezio necesas?

20

Salutmesaĝo de
sincera esperantisto

LA

Lampiro



Vortoj de la prezidanto

Karaj geamikoj, en ĉi tiu vivo ni bezonas interkomuniki. Tial ni estas Esperantistoj: por la komunikado inter popoloj, por la tuta homaro kaj por respekti kulturojn kaj morojn.

Mi kredas ke la beleco de la vivo estas jen la respekto al aliaj personoj, scio kompreni ilian deziron, ilian naciecon. Ne necesas nepre akcepti ĉion, gravas kompreni kaj respekti.

Por respekti aliulan penson, gravas aŭdi. Ni donu nian opinion, sen postuli de alia homo konsenton. Ideojn oni devas pridiskuti.

Bedaŭrinde la viruso daŭras inter ni, kaj mi pensas ke ĝi restos longe. Estas grave ke ni estu inter ni distance, sed ni ne ĉesu interparoli.

Ni parolu per interreto, kaj kiam alvenos vakcino ni faros grandan feston. Konsentite?

Dankon al ĉiuj, kiuj estas kun ni.

Ĝis tiam, EASP deziras al ĉiuj sanon, pacon, kaj multe da interparolado!



Vortoj de la redaktanto

... kaj la kronviruso kronas ankoraŭ super ni, simplaj subuloj de Lia Moŝto. La pandemio daŭras, kaj kun ĝi la nepra socia izoliĝo. Espereble niaj legantoj havos pli da tempo por la nuna Lampiro, kiu proponas faskon da interesaj tekstoj.

Por mildigi la kruelecon de la potenca fireĝo, ni kreas alternativojn. Bv. noti: ĉiun lastan sabaton, je la 17-a horo, EASP okazigas virtualan prelegon per interreto. Se vi interesiĝas, skribu al ni por peti informon. Krome, en ĉiuj aliaj sabatoj, je tiu sama horo, okazas la amuza EASP-Kafejo, nome libera babilejo kiu daŭras unu tutan horon. Prefere sen krokodilado!

Bonan legadon!

PAULO SÉRGIO VIANA

La 8a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj Okazos Ĉi-Jare

MAŁGOSIA KOMARNICKA



**Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj**
Europejski Festiwal Piosenki Esperancistej

Kun granda plezuro mi transdonas belan informon, ke la organizantoj de la 8a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj decidis organizi ĝin ĉi-jare. La kronviroza pandemio malebligis organizadon de la kantfestivalo je ĝia ĝisnuna formo. Tial ĝi okazos **RETE** kaj kun speciala dediĉo al **MILA VAN DER HORST-KOLIŃSKA**, kiu de komenco de la festivalo subtenis ĝian disvolvon.

Tiu nova formo, reta, ebligos partoprenon al pli granda nombro de personoj, kiuj ĝis nun ĉefe pro financoj ne povis en ĝi partopreni. Rajtas partopreni en la 8a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj kantemuloj, esperantistoj kaj neesperantistoj el la tuta mondo. Sufiĉas nur aliĝi kaj poste sendi filmeton kun kanto. Ĉi-jare estos tri kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto, 3. registrita en studio. La aĝkategorioj

estas la samaj: 0-18 jaroj / 19-54 jaroj / 55-111 jaroj. Ĉi-jare sufiĉas **kanti nur unu kanton en Esperanto**. La ĵurio, la aro da internaciaj specialistoj – esperantistoj kaj muzikistoj – ĉi-jare pro escepta situacio pritaksos ĉefe lingvan kaj muzikan korektecojn.

Anonco de la rezultoj kaj dissendo de la premioj al la distingitaj partoprenantoj **okazos post la 12-a de septembro**, ankaŭ interrete, dum la Koncerto de Premiitoj.

Honoran patronecon pri la konkurso akceptis Jacek Sutryk - la Prezidanto de Vroclavo, Bohdan Aniszczyk - la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo kaj la organizaĵoj: Unversala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), EUROKKA (fakasocio de TEJO kaj muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo) kaj JUNA AMIKO (la plej konata kaj ŝatata revuo de Esperantujo) kaj VARSOVIA VENTO (interreta radio).

La organizanto, la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej) invitas ĉiujn partopreni en la 8a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Bonvolu sendi vian aliĝilon kaj filmeton **ĝis la 15a de aŭgusto 2020 – ATENDAS VIN MULTAJ BELEGAJ PREMIOJ!**

Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto) aŭ telefone +48 692 551 131, +48 606 858 640, www.ecem.com.pl <https://www.facebook.com/efekantoj/>

Je la nomo de la organizantoj

Małgosia Komarnicka

Ĝenerala direktoro de Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj ■



Honora Patrosado de la Prezidanto de Vroclavo



Intervjuo

Fernando Pita

Prof-ro Fernando Pita, el Rio-de-Janeiro, estas veterana Esperantisto, artikolisto, preleganto, recenzisto, tradukanto, aŭtoro de lernolibro kaj de plurlingva vortaro. Li ofte kontribuas al Esperanto-revuoj.

Profesie li laboras kiel profesoro de latina kaj hispana lingvoj en universitato.

Ni dankas, ke li akceptis respondi per ĉi tiu intervjuo al La Lampro.

1. Kiam vi Esperantistiĝis? Kio kondukis vin al Esperanto?

Mi esperantistiĝis en 1984, kiam mi vizitis la kvartalan bibliotekon, en kiu okazis ekspozicio pri Esperanto. Mi ĉiam interesigis pri lingvoj, sed ĝis tiam, pro manko de mono, mi neniam estis povinta studi ilin. Tiel, Esperanto estis la unua lingvo kiun mi lernis kaj kiu, poste, estis tre utila kiam mi lernis aliajn: ne nur ĉar ĝi instruis al mi kiel lerni lingvojn, sed ankaŭ ĉar, pro ĝia bazo, vortprovizo de aliaj lingvoj ne plu estis granda problemo. Ĝuste pro mia lernado de lingvoj mi fariĝis instruisto (unue de la hispana kaj poste de la latina), kaj post la magistriĝa kaj doktoriĝa kursoj, profesoro. Tiel mi ja povas diri, ke bonan (la plej bonan) parton de tio, kio mi nun estas, mi ŝuldas al Esperanto.

2. Ni scias, ke vi estas profesoro. Kiel via Esperanto-agado rilatas al via profesia vivo?

Tiu rilato okazas diversmaniere: ĉar mi instruas la latinan, mi ĉiam uzas Esperanton por elmontri – per pli simpla lingvo – fenomenojn komunajn al ambaŭ lingvoj. Rimarku ke mi tion faras ne por, almenaŭ

tiom evidente, esperantigi homojn. Sed por instrui ilin pri la lingvo mem kaj por ke ili almenaŭ havu pozitivan sintenon al la lingvo, en medio kie Esperanto estas ĝenerale kritikata.

Alia afero estas, ke la plej granda parto de mia “scienca produktado”: prelegoj, verkado de artikoloj kaj recenzoj, eldonado de libroj (pere de Esperanta LibroKlubo), estas tute rilata ne al la latina aŭ la hispana, lingvoj kiujn mi instruas, sed al Esperanto mem.

Kaj fine, se la teruraj aferoj vivitaj de Rio ekde 2016 ne estus tiel negative afektintaj la universitaton, mi jam estus preparinta du tipojn de kursoj en ĝi: ĝenerala Esperanto-kurso (ĉeesta kaj enreta), kaj ankaŭ postdiplomiga kurso de Esperanto, celante iel diplomigi homojn kiuj jam parolas kaj eĉ instruas nian lingvon, sed havas nenian oficialan atestilon pri tio.

3. Vi ofte recenzas por Esperantaj revuoj. Kion vi opinias pri la nuntempa literatura produktado en Esperanto?

Laŭ mi, la esperanta literaturo vivas transiran momenton: la grandaj nomoj de la lastaj generacioj

bedaŭrinde jam forpasas, kaj la novaj, kvankam ĝenerale pli bonaj aŭtoroj ol la ĵusantaŭaj ankoraŭ ne okupis la tutan podion.

Sed ne ili kulpas: kvankam ni nun havas nomojn tiel, aŭ eĉ plil, elstaraj ol ties antaŭuloj, homoj ĝenerale, kaj esperantistoj inter ili, legas malpli da libroj, konsumas malpli da literaturo. Alia problemo estas ke, hodiaŭ, plejmulto de movadanaj esperantistoj estas mezaĝaj homoj, kiuj ne emas ŝati bitlibrojn, kie nun la novaj talentoj ja riveliĝas! Do nia literatura merkato vivas interrikoltan periodon: la tradicia maniero disvastigi ĝin ankoraŭ ne mortis, sed la nova ankoraŭ ne plene naskiĝis. (Tamen rimarku! La problemo neniel estas kvalita!!!)

4. Kiu estas via preferata aŭtoro en Esperanto? Kial?

Sed estas tiom da!!! Bone, en la branĉo poezio, mi tre ŝatas Eli Urbanová kaj Geraldo Mattos (aŭtoro kies verko mi studas, kaj kiun mi kredas ne ricevis, dumvive, la ĝustan rekonon); inter la aktualaj, la plej interesaj estas sendube Suso Moinhos kaj Mao Zifu.

En la branĉo prozo, mi tre ŝatas Sten Johansson kaj Julian Modest, kiuj havas fluan stilon, kaj, aliflanke, John Francis kaj Karolo Piĉ (bonlingvistoj jam povas ĵeti ŝtonojn sur min, sed mi amas aŭtorojn lingve revoluciemajn). Sed estas du verkistoj el kiuj mi tre ŝatus legi ion freŝan: Ulrich Matthias kaj Sara Larbar!

Fine, mankas ke iu Paŭlo Sérgio Viana, bonega tradukisto, nun verku propran romanon, ĉar la esperanta komunumo jam delonge atendas

tion!

5. Kion vi opinias pri la Esperanta kulturo ĝenerale, en la nuna jarcento?

Kiel en la tuta mondo, nia kulturo vivas la samajn defiojn vivitajn de ĉiuj aliaj: kiel gardi siajn tradiciojn en mondo kie kaj kulturo mem unueciĝas (surbaze de la anglalingvaj potencoj) kaj antaŭeniroj de sociaj retumoj igas ke la disvastigo de kulturo mem ne plu restu en malmultaj manoj? Ĉi-kaze la esperantaj muzikistoj avantaĝas, ĉar per Jutubo kaj aliaj retumoj ili sukcesas pli trafe atingi sian publikon. Tamen, aliflanke, tiuj retumoj disvastigas ilian laboron sed ankoraŭ ne donas al ili tiom da mono kiom ili fakte meritas. Do, certe estas aro da problemoj, sed la fakto mem ke la esperanta kulturo travivas ilin same kiel alia, elmontras ke estas kulturo en plena agordo kun nia – same problema – nuntempeco.

6. Se vi povus doni unu solan konsilon al juna Esperantisto, kiu ĵus lernis la lingvon per Duolingo, kion vi dirus al li?

Mi certe dirus ke tiu homo donis la unuan paŝon en vojon kiu kondukos lin al tri tute novaj aferoj: al nova komunumo, de homoj kiuj, kvankam disaj, vivas, sentas kaj laboras kune; al nova, pli frateca vizio de kaj aliro al la tuta mondo, ne plu filtreblaj de la posedantoj de la komunikaj rimedoj; al nova kulturo, originala kaj bazita sur sento de aparteneco al la tuta homaro. Kaj ke indas laŭiri tiun vojon! ■

Nia leganto Luís Euclides dos Santos sendis al ni kortuŝan tekston, per kiu li omaĝas gravan personon. Gravan aparte por li! Tiu bela iniciato venigis al ni la ideon, ke multaj el ni ŝatus omaĝi forpasintan karulon, esprimante sian dankon. Se vi emas omaĝi iun tian, sendu al ni vian tekston. Ekzistas multaj nefamaj bonegaj personoj en la mondo, kiuj meritas tian rememoron. Ni esprimu nian dankon kaj amon al ilia memoro!
(N. de la R.)

Omaĝo al mia patrino

LUÍS EUCLIDES DOS SANTOS (MARÍLIA-SP)

Maria Nilza naskiĝis la 2-an de decembro 1928 en la urbo Igreja Nova, ŝtatinterno de Alagoas, kie ŝi kreskis. Je la aĝo de 22 jaroj, ŝi edziniĝis kun Otacílio, kiu ankaŭ naskiĝis kaj kreskis en la samaj urbo kaj ŝtato. Ili havis filinon, kiu forpasis ankoraŭ kiam ŝi estis bebo.

Tie ambaŭ laboris en la agrikulturo, veninte poste al ŝtato San-Paŭlo, serĉe de pli bonaj vivkondiĉoj. Ĉi tie ili vivis en pluraj kamparaj areoj, precipe en la regiono de la urboj Lins kaj Cafelândia, ankaŭ laborante en la agrikulturo. Ili havis aliajn kvin gefilojn.

La familio alvenis en la urbon Marília en decembro 1968. Per multa malfacileco, sed ankaŭ per multa determino kaj persisto, Maria Nilza kaj Otacílio sukcesis eduki siajn gefilojn. Kvankam la gepatroj ne havis la ŝancon lerni, ili konsideradis la edukadon kiel prioritaton por siaj gefiloj. Tial ili faris ĉion, kion ili povis por ke ĉiuj havu aliron al la edukado.

Maria Nilza vidviniĝis en 1980, je la aĝo de 51 jaroj. Firma virino,

batalema kaj defendanta la familiajn valorojn, ŝi tenis la familion unuiginta per instruoj kaj vivekzemploj, kiujn ŝi tre saĝe transdonis. Maria Nilza havis ankaŭ ok genepojn, kiujn ŝi senlace helpis eduki.

Maria Nilza forpasis la 2-an de aŭgusto 2016, je la aĝo de 87 jaroj. Ŝi estis forteco, havis admirindan memoron, grandan amon al la vivo kaj nekredablajn kur-aĝon kaj venkokapablon. Fervora katolikino, ŝi kredis je la povo de la karitato kaj malavareco. Estimata de ĉiuj, ŝi kutimis diri, ke ni devas trakti la proksimulon “kun amo kaj kareso”, io, kion ŝi ĉiam faris. ■



Ĉu poezio necesas?

PAULO P NASCENTES


La titolo alvenis mian kapon tuj post la invito artikoli por La Lampiro. Instiga demando, ĉu? El ĝi naskiĝis poeziaĵoj de Nazaré Laroca, Paulo Viana kaj ĉi tiu Artikolisto, kvazaŭ la triopo volus pruvi prian tezon. Miaflanke la tasko nun estas aldoni al tiu debato klerajn vortojn de la meksika eseisto, recenzisto kaj poeto Octávio Paz (2015; 2017). Benu nin “la naŭ muzoj, nome Erato (ampoezio), Eŭterpo (muziko), Kaliopo (eposo), Klio (historio), Melpomeno (tragedio), Polimnio (religia poezio), Talio (komedio), Terssikoro (danco) kaj Uranio (astronomio)”. Bv. kontroli tion ĉe Vortaro Túlio Flôres.

Jen bona momento alvoki Paz (2015). Klasikaĵo pri studoj pri Poezio, en tiu libro Paz diskutas kernajn konceptojn pri verso, prozo kaj poezia imago per abundaj ekzemploj. La ĉapitro kiu donas la titolon al la libro, “Signos em Rotação” [Signoj en Rotacio], gravas por ampleksa kompreno pri la moderna koncepto

de Poezio kaj la rolo de poeto en la nuntempa socio. La tezo estas, ke pro la historiaj kondiĉoj restas nuntempe al ampoezio, ke ĝi sin turnu sur si mem, do iĝu metalingva: jen do kial hodiaŭ vidiĝas la super-rego de la tielnomata metapoezio. Tial dum la moderneco abundas metapoeemoj.

La unua ĉapitro de Paz (2017) estas “Poesia de Solidão e Poesia de Comunhão” [Poezio de Soleco kaj Poezio de Komunio]. Temas ĝi pri ia tensio kadre de la lirika poezio. Unuflanke, okazas alvoko al komunio de poeto kun Dio, kun si mem kaj kun aliaj homoj. Aliflanke, venas “la rekono de la senhelpa humana soleco”. Tiuj du polusoj aperas en la poezio de João da Cruz [Johano de la Kruco] kaj de Quevedo [Kevedo]. Tiu tensio konsistigas la naturon mem de la lirika poezio kaj tio reliefigas en la moderna nuntempa poezio.

Kulturaĵo ekzistanta ekde praa tempo, Poezio eble frue aperis, tiel





ke pra-homoj unue poeziumis! Meze de elementaj eroj de lingvaĵoj, anstataŭ kompleta frazo, grumbloj, aludaj signoj pri sencaĵoj, humuroj, necerta malkvieto veninta el subjektivaj kaj objektivaj minacoj. Certe vortoj kiaj “subjektiva”, “objektiva” ne aplikiĝas, ĉar tia diferenco malestis. Poezio tamen rilatiĝas al originalaj eldiraĵoj por nekonataj fenomenoj. Ĝis hodiaŭ se ajna funkcio ekzistas por poezia esprimo certe temas pri la defia eblo diri nedireblaĵon. Tio ĉiam abundas, ĉu? La poezia rigardo ĉiam nin surprizas pro la novigo, aŭ cetere

estos ja Poezio. Rimaj esprimoj dirantaj banalaĵojn, ĉu eblas nomition poezia arto? Certe ne. Eble se paroli pri misio de Poezio ĝi estos la edukado al plia sentebleco, rafiniteco de sentoj, al ia maniero koni la realon, tiel kiel Filozofio, Scienco, Arto, Tradicioj. Memkono kaj memŝanĝo, aliĝo al nova mondovizio certe venas el la intuicia mondo de filozofoj, sciencistoj, artistoj kaj ceteraj inspiritaj revuloj. Imagopovo estas la povo imagi novigon, tio estas, igi videblaj la arĥetipajn imagojn alvenintajn el la kolektiva nekonscio, el apenaŭ vizitebla spaco

supramensa, do for el la ordinara tridimensia mondo de spacotempo. Se tamen tiel estos, kial tiom da homoj konfesas malŝati legi poemojn, eĉ tiujn de konsiderataj plej bonaj poetoj, kiaj Danto, Kamono, Cervanto, Ŝakespiro, Kevedo, Nerudao, Fernando Pessoa, Drummond kaj aliaj klasikuloj? “Ho, tio estas tempoperdo: mi havas pliajn objektivajn farendajojn!” La brazila dramaturgo Nelson Rodrigues nomadis tiujn homojn “la idiotoj de la objektiveco”. La demando estas ĝis kiu punkto tio venas el lama Eduko, kiu senigas studentojn el la necesaj momentoj de intima kontakto kun tiu interna nekonata instanco, nome revo-kapablo, animo, Si-mem. Sen sufiĉa stimulo al la kultivado de ena vivo, kio estos atendebla krom malalta materiismo, supraĵa volo, stulta mankosenco pri la vivo mem? Finfine, “la arto ekzistas por ke la realaĵo ne detruu nin”, asertas Nietzsche. Laŭ Jung, “li [la poeto] estas, en la plej profunda senco, instrumento de sia verko, kaj tial estas sub ĝi. Ni ne povas iel atendi, ke la poeto estu la interpretisto de sia verko. Aranĝi ĝin estis lia supera tasko” (2018: 107).

Se poemoj havas ion por riveli pri poezio kaj ĝia kreado, jen do la voĉo de la gaŭĉa poeto Mário Quintana [Marjo Kintana]. Jen mia esperanta versio:

*La poemoj estas birdoj, kiuj alvenas
oni ne scias de kie kaj eksidas
sur la libro kiun vi legas.*

*Kiam vi fermas la libron, ili ekflugas
kvazaŭ el birdo-kaptilo.*

*Ili havas nek rifuĝejon
nek havenon;
ili momente sin nutras per ĉiu
manĝaro kaj foriras.*

*Kaj vi do rigardas tiujn viajn malplenajn manojn,
en la rava miro scii,
ke ilia nutro jam estis en vi...*

Quintana, M. 2005: 469.

Kara leganto, ĉu fine poezio necesas? Dum la birdo de ena respondo ne eksidu nianime, poeziumu ni! Ke ĉi nuntempa kruda reala-ĵo ne detruu nin!

Referencoj

- JUNG, C. G. O Espírito na arte e na ciência. 8. ed. 9ª reimpressão. Petrópolis: Vozes, 2018.
- PAZ, O. Signos em rotação. [Trad. Sebastião Uchoa Leite; org. e rev. Celso Lafer e Haroldo de Campos]. São Paulo: Perspectiva, 2015. (Debates: 48).
- PAZ, O. A Busca do presente e outros ensaios. [Org. e trad. Eduardo Jardim]. Rio de Janeiro: Bazar do Tempo, 2017.
- QUINTANA, M. Poesia completa. Rio de Janeiro: Nova Aguilar, 2005.

Iom da filozofio

kun José Mauro Progiante

Ne ekzistas dankemo sen ĝojo

Mi ne povus ĝoji sen la resto de la universo, ĉar sen ĝi mi eĉ ne ekzistus.

(André Comte-Sponville, franca filozofo)

Se ni ŝatas vivi, ni havas motivon por esti dankemaj, ĉar estas evidente, ke ni ekzistas pro ekstera kaŭzo.

Krom la vivo, la plimulto de la bonaĵoj, kiujn ni ĝuas, ne estas kreitaj de ni. Ili venas aŭ de aliaj vivuloj aŭ de la naturo. Foje ili fontas el persono, kiu favoras nin per sia kuraĝo, talento, bonkoreco aŭ amo; foje el la varmeco de la suno, el flora parfumo, el rava pejzaĝo, el kantanta birdo...

Dankemo estas la kapablo rekoni kaj esprimi tion, ordinare per elmonro de ĝojo, ne necese per redono.

Oni ne devas konfuzi dankemon kun devo redoni. Ne estas vera dankemo, se oni reciprokas la bonaĵon ricevitan nevolonte, sen ĝojo. Eĉ egoisto agas tiel, sentante, ke li perdas ion, sed antaŭvidante estontan profiton. Egoisto neniam estas dankema, ĉar malplaĉas al li agnoski eksteran helpon. Dankemo ne implicas interŝanĝon kaj redono sen ĝojo estas nura interŝanĝo.

Aliflanke, povas ekzisti dankemo eĉ en situacioj, en kiuj redono estas neebbla. Kompreneble oni ne povas reciproki la lumon de la suno, la belon de stelplena ĉielo, la instruojn de mortinta saĝulo. Sed tio ne malpermesas, ke oni sentu dankemon.

La filozofoj rimarkas, ke dankemo havas limojn kaj

devas submetiĝi al alia virto: la justeco. Ekzemple, oni ne devas, pretekstante dankemon, mensogi por senkulpigi krimulon kaj sekve okazigi kondamnon de senkulpulo.

Notinda trajto de dankemo estas, ke ĝi rilatas al la pasinteco kaj pro tio multfoje ĝi hezitas la homon inter pento kaj konsoliĝo. Ne malofte, rememorante niajn decidojn dum la vivo, ni konkludas, ke ni forgesis aŭ rifuzis danki iun, kaj pro tio ni

pentas. “En tiu tago mi rompis kun mia patro, sed nun mi vidas, ke li pravis. Tro malfrue. Li ne plu estas ĉi tie, por ricevi mian dankon.” Tamen tiu retrorigardo en la pasinteco povas ebligi forigon de la funebro, de la perdo. Tiu, kiu suferas pro ies foresto, povas trovi konsolon en la dankemo. “Li forpasis, sed kiel bone, ni kunvivis longe!” Tia estas dankemo, ĉiam ĝojplena kaj dolĉiga. ■



SimDe - Wikipedia

La milito

LEON ELIACHAR (1922-1987)

Leon Eliachar (1922-1987) estis ĵurnalisto, kiu naskiĝis en Egiptio sed lia familio enmigris al Brazilo kiam li estis bebo. El lia sinprezento: "Mia nomo estas ĝuste tia, Leon Eliachar, kaj mi aĝas 44 jarojn, sed mi fieras iam havi 43, 42, 41, 40, 39 jarojn, aĝoj, kiujn multaj kvindekjarulinoj neniam atingis". Iam li asertis: "Mi neniam deziris la edzinon de la proksimulo; nur tiun de la malproksimulo".

Kaj ĝuste tial li estis murdita 65-jaraĝa en Rio, pro adolto kun la edzino de riĉa bienulo.

En lia humurlibro "La homo reduktita al nulo" (O Homem ao Zero) mi legis la jenajn difinojn pri milito, en la ĉapitro "Praktikaj lecionoj por teoriaj lernantoj":

trad. JAMES R. PITON

La homaro dividas sian tempon laŭ du partoj: milito kaj paco. Dum pacotempo, ĝi diskutadas la militon kaj dum militoj ĝi pledegas por paco. La milito estis inventita de ulo, kiu mortis dummilite. La paco ankoraŭ ne estas inventita. Estas pluraj militspecoj: la malvarma milito, la varma milito, la duonvarma milito, la revarmigita milito kaj la milito mem, de kiu neniu sukcesas eskapi, ĉar ĉiuj estas kunvokitaj eĉ antaŭ ĝia komenciĝo. Iam la milito okazis per paŝado:

kiam la soldatoj alvenis al malamika lando, jam ne plu estis milito.

Nuntempe la milito estas pli rapida: sufiĉas premi butonon por ke ĝi komenciĝu kaj samtempe finiĝu - kaj kiam ĝi finiĝas oni ne retrovas eĉ la butonon. Dum la paco, la homoj sin pretigas por la milito konstruante tankojn, aviadilojn, submarŝipojn, raketojn, taksiojn kaj elektrajn busojn. Kiu fuĝas de la milito nomiĝas dizertinto, kiu restas nomiĝas he-

roo. La dizertinto fuĝas de la milito por ne morti fare de malamikoj, sed fine tiu mortas fare de la amiko: li estas pafmortigita. Pafmortigo estas procezo mortigi militfuĝinton - anstataŭ morti senatente, tiu mortas antaŭavertita. Antaŭ ol iri al milito, kuracistoj submetas soldatojn al plena ekzameno: kiu estas en bona sano, tiu rajtas iri kaj trankvile morti. Kiam viro estas rekrutigita, li ricevas unifor-mon; kiam li eniras militon, la uniformo estas tute farbita por ke oni ne vidu, ke li havas uniformon. Ekzistas famaj militoj: tiu el 14, ĉar nur postrestis dekkvaropo; tiu de la Cent Jaroj, kiu en la fino nur havis maljunuletojn kaj tiu el 39 - kiun ĉiuj supozas finita. Multaj militistoj reiras hejmen kun militpsikozo, sed la psikiatroj tute fajfas pri la pacpsikozo - kiu estas multe pli malbona. Kaj, nekredeble, la plej famkonata soldato en milito estas la nekonata soldato. ■

Tra la Mondo

MÁRIO MENEZES

Mi deziras skribi iom pri mia vivo tra la mondo. Mi laboris en la brazila diplomatia servo.

Mi klarigas ke antaŭ ol labori en Itamaraty, mi estis industrilaboristo kaj instruisto en mezgradaj lernejoj, kaj en 1995 mi emeritiĝis post 35 jaroj da laboro.

En 1997, mi estis aprobita en konkurso de Itamaraty, kaj mi iris al Braziljo por esti trejnata dum du jaroj, antaŭ la unua eksterlanda laboro.

En 1999, mi estis sendita al Kolombio por anstataŭi kolegon kiu devis reveni al Braziljo por solvi urĝan privatan problemon. Estis mia unua laboro eksterlande. Mi tie laboris dum kvin monatoj.

En 2000 mi devis komenci la efektivan laboron eksterlande. En la unua fojo, kiam oni estas sendata por eksterlanda laboro, oni revas esti sendata al Londono, Parizo k.s.. Tamen, tiuj famaj landoj estas por tiuj, kiuj ĝenerale ne estas komencantoj. La komencantoj ne elektas landojn; ili estas sendataj al la nedezirataj landoj. Al mi, oni proponis du riĉajn landojn: Niĝerio kaj Nikaragvo.

Evidente, mi elektis tiun landon pli proksiman al Braziljo. Nikaragvo

estas la dua plej malriĉa lando en Ameriko. Mi laboris en la ambasado dum preskaŭ tri jaroj. Malgraŭ la povraj vivkondiĉoj de la popolo, mi tre ŝatis tie labori, ĉar en tiu centramerika lando mi povis helpi kelkajn malriĉajn infanojn. La helpo daŭris ĝis la fino de mia diplomata misio tra la mondo. En Nikaragvo, mi ankaŭ instruis Esperanton; tiam, estis nur unu parolanto de Esperanto en tiu lando.

El Ameriko, mi iris al Azio. Mi laboris en Nagojo. Vere ne estis mia propra deziro tie labori. Mi elektis tiun landon por kontentigi mian edzinon kiu estis zorgema pri filino kiu tie loĝis. En Japanio miaj geamikoj estis gejapanoj kaŭze de Esperanto. Ili petis ke mi prelegu pri Braziljo en kelkaj urboj de centra kaj norda Japanio. Mi ankaŭ helpis en kurso de Esperanto.

En Japanio, mi ĉeestis mian unuan Universalan Kongreson de Esperanto. Post du jaroj kaj duono, mi lasis la landon de naskiĝanta suno.

Post Japanio, mi elektis Eŭropon, Germanion, por labori. En Itamaraty, la laborejoj eksterlande estas en ambasadoj, diplomataj misioj, konsulejoj kaj vickonsulejoj. Kolonio (Köln) estis mia nova laborejo. Ĝi estas la plej agrabla loko

kie mi laboris tra la mondo. En Kolonio, mi ankaŭ prelegis pri Brazilo. Dum mia laboro en Germanio, mi sugestis al la Konsulo instali moveblajn konsulejojn por servi dimanĉe aŭ sabate la brazilanojn kiuj loĝas en ŝtatoj malproksimaj de Frankfurto. La brazilanoj tre ŝatis la novan servon. Dum mi laboris en Germanio, mi ĉeestis UK-ojn en Pollando kaj Danujo.

Mia lasta laboro eksterlande estis en la ambasadejo de Slovakio. Por labori tie, mi estis invitita de mia eksestrino kiam mi laboris en

Braziljo. En 2010, ŝi estis enoficigita kiel ambasadorino en Slovakio. En Slovakio kaj Ĉeĥio mi havis bonajn esperantistajn geamikojn. Mi devas klarigi ke, kiam mi komencis labori en la diplomata servo, mi kaj alia kolego jam estis olduloj, kaj tial nia rango estis nur vickonsulo; ni ne povis sekvi karieron kiu havas sep nivelojn ekde tria sekretario ĝis unua ministro kiu, esterlande, estas ambasadoro. En 2014, mi sepdekjariĝis... mi estis devigita lasi la publikan servon. Mi revenis al mia Brazilo kiel reemerita. ■



Josh Noel, Chicago Tribune

Salutmesaĝo de sincera esperantisto

MAURO NEPOMUCENO

Unue permesu, ke mi prezentu min al ĉiuj vi. Mia nomo estas Mauro Nepomuceno, mia familia nomo originas el antikva Ĉeĥio, pli precize de la kanonizita Sankta Johano Nepomucký, kiu naskiĝis en urbo Nepomuk en la jaro 1345. Tamen mi ne parolos pri la Sanktulo Johano, sed pri mia vivo, iom de mia historio.

Mi naskiĝis en malgranda urbo en la regiono metropola de la Ŝtato San-Paŭlo, mia malgranda kaj bela urbeto konata kiel Salesópolis. Tie naskiĝas grava rivero de nia Ŝtato, nome Rivero Tietê.

Vere mi estis invitita rakonti rakontojn pri mia profesio aŭ pri mia kariero, tamen iuj klarigoj necesas, kiujn mi konsideras gravaj.

En mia infana vivo mi ricevis nur unu fojon kristnaskan donacon. Tio okazis, kiam mi estis nur 8-jara, kaj la donaco estis fajrobrigada kamiono, speciala donaco kaj je kio tio rilatas al mia profesio, vi vidos kaj komprenos.

Kiam mi estis juna kaj ĉar en mia urbo oni ne permesis ajnan tipon de industrioj eĉ se ĝi ne estas malpuriga, tial la laborpostenoj estis malabundaj kaj revo de ĉiuj junuloj estis labori en la urbestrejo de nia municipo, sed ne

estis facile ekhavi revitan laboron tie. Ĉiam estis espero, ke mi povos labori en la urbestrejo, tamen la jaroj pasis, mi nun jam estis juna plenkreskulo kaj ankoraŭ sen bona laboro.

En certa momento de mia vivo granda amiko de mia familio havigis al mi laborpostenon en granda sterk-industrio en la urbo Mogi das Cruzes. Tie mi laboris dum preskaŭ du jaroj. Pro la transdono de la fabriko al alia Ŝtato, mi perdis mian laboron kaj denove estis sen laboro, tiel la revo revenis al mi: labori en la urbestrejo.

Ĉar mi estis senlaborulo, por akiri iom da mono mi laboris je krudaj servoj, kiel masonisto-helpanto, pentristo de domoj kaj aliaj servoj, sed tio ne kontentigis mian penson pri mia estonteco.

Aperis en mia vivo granda amiko de la infaneco kiu lastatempe aliĝis al la militistaro, kaj li konsilis, ke ankaŭ mi submetiĝu al publika konkurso por aliĝi al arma polico. Mi tuj ektimis, mi neniam pensis esti policisto, profesio danĝera. Ĝi celas ĉesigi friponaĵojn, kontraŭbatali krimojn kaj uzas armilojn. Ĉio tio kontraŭis la principojn de mia religia kredo, mi pensis ke ne eblas al mi

mortigi iun, eĉ se por defendi min aŭ alian homon. Sed mia granda amiko nur volis helpi min.

La sorto kaj Dio decidis do kontraŭ ĉio kaj ĉiuj. Mi estis aprobita en polica konkurso, kaj mi devis akcepti tion, kion mi komence rifuzis.

De proksimume dek jaroj mi laboras en bela servo, kontraŭ krimoj kaj por la konservado de publika ordo. Vere, mi komencis ŝati mian profesion, kaj ĉi-ene mi sciis ke mi povus esti translokigita al aliaj lokoj, kiel fajrobrigadisto, arbara policisto aŭ alispecaj policoj, kaj tio venigis lumon al mi. Mi esti translokita al kazerno de la fajrobrigado, kaj post

kelkaj jaroj kaj klopodoj, pere de internaj administraj paŝoj mi alvenis al la kazerno de fajrobrigado en urbo Mogi das Cruzes, kie mi realigis miajn revojn de infano. Krome, servi aliajn konformas al mia kredo, ĉi tiu estas unu el la celoj de la institucio. Ĉi tie mi laboris dum 15 jaroj. Grave estas informi, ke la fajrobrigado en la urbo Mogi servas ok urbojn, interalie la urbon, kie mi naskiĝis.

Multajn sociajn servojn oni plenumas en tiu institucio. Multajn aventurojn oni travivas, kaj eble mi povos estonte rakonti al vi kelkajn el ili. ■



Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

Demando

Oni instruas, ke akuzativo en Esperanto montras la objekton aŭ la celon de ago, kaj ke ĝi povas anstataŭi prepozicion. Sekve, ĉu estas ĝustaj la subaj frazoj?

*Petro eliris la lernejon je la oka horo. Kiam Johano elvenis la ĉambro**n**, li glitis kaj falis. La juĝisto kolere elpaŝis la salono**n**.*

Respondo

La ĉi-supra demando rilatas la jenajn du punktojn de la *Plena Gramatiko* (el la *Fundamento de Esperanto*):

13) *Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.*

14) *Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion “je”, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio “je” oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.*

La *Ekzercaro* de la *Fundamento* donas pliajn klarigojn. El la alineo 17 mi citas:

[...] por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon “n” ; sekve : tie (=en tiu

loko), tien (=al tiu loko); tiel same ni ankaŭ diras : “la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon”, kaj la vortoj “ĝardenon”, “tablon” staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj “en” kaj “sur” tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon “n” tute egale, ĉu ia prepozicio starus aŭ ne. — Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon). — Mi restos hodiaŭ dome. — Jam estas tempo iri domen. — Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren. — Flanken, sinjoro! [...]

Sekve, laŭ la alineo 13 de la *Gramatiko* kaj laŭ la alineo 17 de la *Ekzercaro*, estas tre klare, ke la N-finaĵo de direkto rilatas almovon, sed nek elmovon, nek demovon, nek formovon.

Tamen la alineo 18 de la *Ekzercaro* povus kompliki la aferojn:

Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion “je”. Sed estas bone uzadi la vorton “je”

kiel eble pli malofte. Anstataŭ la vorto “je” ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. — Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ : mi ridas lian naivecon). — Je la lasta fojo mi vidis lin ĉe vi (aŭ : la lastan fojon). — Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ : mian perditan feliĉon). — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple, ni povas diri “obei al la patro” kaj “obei la patron” (anstataŭ “obei je la patro”). Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas; ekzemple : ni povas diri “pardoni al la malamiko” kaj “pardoni la malamikon”, sed ni devas diri ĉiam “pardoni al la malamiko lian kulpon”.

Laŭ la lasta parto de ĉi tiu alineo, oni rajtas — laŭ iom streĉa rezono — uzi la N-finaĵon post verboj de elmovo (*eliri, elveni, elpaŝi*), rigardante ilin kiel transitivajn. Sekve la N-finaĵo en tiuj okazoj markus ne direkton, sed ja rektan objekton. Tamen Zamenhof ne uzis la N-finaĵon por esprimi elmovon, kaj kiam li uzis la

N-finaĵon post *eliri* aŭ *elpaŝi*, tiam li klare intencis esprimi almovon; ekzemple:

Kaj *Sihon eliris kontraŭ nin*, li kaj lia tuta popolo, por batalo apud Jabac. (MT)

Kiam vi *eliros en militon* kontraŭ viajn malamikojn [...] (MT)

[... li *eliru ekster la tendaron* [...]] (MT)

[...] oni metos sur vin ŝnurojn kaj ligos vin per ili, kaj vi ne povos *eliri* inter ilin [...] (MT)

Multaj aferoj ŝanĝiĝos, kiam mi *elpaŝos en la vivon!* (FA3)

[...] antaŭ ol ni *elvenas en la mondon* [...] (FA3)

Ĉe aliaj aŭtoroj tre malofte troveblas la N-finaĵo en esprimoj de elmovo, sed miaopinie tia uzado, kvankam teorie ebla, ne estas sekvida, pro risko de malklareco, kaj ankaŭ ĉar ĝi kreas konflikton inter gramatikaj reguloj. Konklude, ni restu kun Zamenhof.

Simboloj: MT = *Malnova Testamento*; FA3 = *Fabeloj de Andersen* (3-a volumo). ■

easp.org.br

Librorecenzo

PAULO SÉRGIO VIANA

Titolo: "Kunpatroj kaj kunpatrinoj -
sep rakontoj pri eŝuoj kaj
pomboĝiroj"

Aŭtoro: Ademir Barbosa Júnior

(Dermes)

Eldonejo Libera, 2019,

Esperantigis: Fernando Pita

Mi supozas, ke plej multaj Esperantistoj en la mondo tute ne scias, kio estas Umbando. Ĉi tiu vorto eĉ ne ekzistas en la Plena Ilustrita Vortaro. Ankaŭ en Brazilo, kie naskiĝis tiu religio, antaŭ iom pli ol unu jarcento, multaj homoj ne estas ĝuste informitaj pri ĝi. Ankoraŭ kovras ĝin amaso da antaŭjuĝoj, kondamnoj, diskriminacio kaj suspektemo. Jen kial mi estas tre kontenta, ke aperis ĉi tiu verko en nia



lingvo, kiun uzas homoj teorie kontraŭaj al tia sinteno de maltoleremo kaj spitado.

Mi devas klarigi, ke mi mem tre malmulton scias pri Umbando, do ankaŭ al mi ĉi tiu verko malfermis la okulojn. Umbando naskiĝis en Brazilo, kiel miksaĵo de afrikdevenaj, indianaj kaj katolikaj kredoj. Ĝiaj kultoj, komence alprenitaj de simplaj popoloj, inkluzivas dancojn,

muzikon, perkutadon, altaron, manifestiĝon de spiritoj kaj kredon pri reenkarriĝo. Pro la mediumaj fenomenoj kaj instruoj pri reenkarriĝo, multaj homoj konfuzas ĝin kun Spiritismo, kiu tamen devenis de eŭropa kulturo.

Ĉi tiu libro enhavas rakontojn, kiuj bele ilustras, kiel funkcias la umbandaj aferoj en la praktiko. “Spiritoj” klarigas, kiel okazas interagado inter ili kaj la surteraj homoj. Ĉiuj historioj estas tre atentokaptaj kaj pensigaj, kaj jen la granda valoro de la tuto: montri, ke la intenco de umbandistoj estas helpi la homojn kaj konduki ilin al sento kaj agado por frateco, justeco, bona fido kaj konstruo de pli bona mondo. La tradukinto por tio enkondukas fakajn terminojn, foje ne tradukeblajn, por transdoni en

Esperanto tradiciajn nomojn de figuroj kaj faktoj en la umbanda fenomenaro. Feliĉe li aldonis terminaron fine de la libreto, kiu iom faciligas la komprenon de tiu kompleksa universo.

La aŭtoro estas prezentita en la eldono kiel universitata profesoro, intelektulo kun elstara agado en la brazila kultura vivo. La tradukinto, same konata, eminenta Esperantisto, fakulo pri la latina lingvo en la Universitato de Ŝtato Rio-de-Ĵanejro. Al ĉi tiu lasta ni devas danki por ĉi tiu grava kontribuo al nia literaturo en Esperanto.

Rim.: Intence mi ne aludas ĉi tie al la lingva aspekto de la traduko, ĉar mi ne emas pedanti. Tamen, tute amike, kaj konsiderante la gravecon de la verko, mi eble rekomendus zorgan revizion de la Esperanta teksto. ■

ANNA LOBO

NENIU SCIAS KE MI ESTAS TIE ĈI

Originala titolo: Nadie sabe que estoy aquí

Direktoro: Gaspar Antillo

Aktoroj: Jorge Garcia, Gastón Pauls kaj Maria Paz Grandjean

Lanĉo: 24.06.2020

Tempodaŭro: 91 min

Lando: Ĉilio

La filmo pri kiu mi parolos ĉi-foje, estis indikita de Paŭlo Sergio Viana - nia granda redaktoro. Jam dekomence, ĝia nomo estas ege interesa, pensiga. 'Neniu scias ke mi estas ĉi tie'. Ĉi tie, kie? Kiuj verŝajne devintus scii? Kiu estas tiu mi? Multe da demandoj venas je atento al tiu titolo, kaj ankaŭ multe da esplorado pri tio, kion ĝi signifas.

Mi vidas ke vi ĉiuj kiuj legas min estas scivolemaj. Pri kio do, temas tiu kurioza filmo? Laŭgrade kiel oni spektas, oni malkovras iom post iom, inter nuntempo kaj pasinteco, pri la vivhistorio de iu dika homo, kiu nomiĝas Memo. Li, kiam infano, amegis kanti. Sed, pro sia korpo kaj aliaj kialoj, li estis ege vundita dum sia vivo. Kaŝiĝis de ĉiuj kaj ĉio, apenaŭ parolis kaj entute ne amikiĝis. La filmado estas tre bone farita kaj kun tre latinamerika vidpunkto, belaj



koloroj kaj interesaj scenoj. Estas impreso ke la direktoro estas novulo en la medio. La aktoroj estas ege bonaj kaj trafaj por siaj roloj. Vi vere sentas vin kortuŝita dum ĝia spektado.

Vi povas senti la pezon kiu estas levi la barojn kaj ne plu montriĝi al la mondo. Kiom da energio oni malŝparas klopodante ne esti vidata. Kaj ĉio tio pensigas nin, ĉu ne? Kiom de la samo okazas al ni? Kiel estus elekti malsame? Ankaŭ estas montrite pri la malboneco en industrio de muziko kaj konsekvencoj de insultoj kaj moralaj persekutoj.

Tiu filmo troviĝas en Netflix. Kaj se tio kion mi rakontis plaĉas al vi, mi serioze konsilas vin spekti tiun ĉi mojosan filmon. Ĝuu kaj akompanu la vivhistorion de tiu ĉi kuriozulo! Bonan spektadon kaj ĝis poste! ■

Machado de Assis

Fiere sin prezentas al la esperantistoj!




Titolo: Postmortaj rememoroj de Brás Cubas
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 248 paĝoj

Prezo: R\$ 35,00



Titolo: Esav kaj Jakob
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 272 paĝoj

Prezo: R\$ 35,00



Titolo: Dom Casmurro
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 260 paĝoj

Prezo: R\$ 35,00

VENU ĜUI BELAN SEMAJNFINON EN LA PLAĜO



Agado inter amikoj

Amikoj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo nuntempe starigas agadon por kolekti rimedojn kun la intenco pagi la kostojn de la sidejo de EASP. Por tio, ili starigas latumon de 3-taga gastigado por 4 personoj en ĉaleta bonege lokita, 200-metrojn for de la pramo (enirejo al la urbo Ilha Bela/SP), en loko kun vendejoj (apoteko, kafejoj, restoracioj kaj urbaj transportiloj, ĉio en proksimeco de 100 metroj). Oni provizas unu lokon por propra aŭtomobilo, etan kuirejon, televidilon, litkovraĵojn kaj bonkovraĵojn. La rezerva validas por la 12-a de oktobro 2020, kiam supozeble jam ne estas la kvaranteno. Oni lotumos 1 el 100 numeroj, kiu respondos al la 2 lastaj numeroj de la unua premio de la federacia Lotumo, en la 26-a de septembro (sabate) 2020. Ĉiu bileto kostos po 30 realoj, kaj oni povas aĉeti ĝin per la retejo de EASP (easp.org.br/butiko).

